Sköv̂de la 6:an de dec. 1945.

Al la kunestraranoj de SEF.

Amikoj,

Okaze de la korespondado kun s-ro Roland Dupuis, Rouen, pri event. kondiĉoj rilate al prelegvojaĝo en nia lando, mi volas sciigi al vi, ke intervenis gravegaj okazintaĵoj, kiuj ŝanĝas la tutan situacion.

Jen mi donas eltiraĵon el letero de s-ro Dupuis:

"..... okazis katastrofo ... mia kompatinda, juna edzino mortis la 6:an de novembro sekve de ĉebrusta tumoro /pro kiu malbona recidivo sur la pulmoj iu nekompetenta doktoro diagnostikis koklušon...

Do, neniu el ni tri iros baldaŭ al Svedujo. Tamen mi ŝatus viziti vian nacian kongreson venontjare. Ĉu vi bonvolas, kara s-ro Åberg, sciigi al mi datojn, programon ktp. Mi volas revidi Svedlandon.

Ĉu vi bonvolas aboni̇gi min je Svenska Esp.-Tidningen? Mi pagos per ĝiro de mia poŝtĉekkonto en Stokholmo nr 15 70 07.

....."

En alia parto de sia letero s-ro Dupuis skribas:

" Per la jena mi sciigas al vi, ke ĉiu esperantisto sveda aŭ ne esperantisto sveda estas en mia hejmo bonvena se bonedůka. Almenaŭ por unutaga restado kaj logado. - Do, bonvolu eventuale sciigi al mi pri samlandano via trapasonte Rouen, se povas iu aranĝo renkonta esti agrabla aŭ utila al konato. ..."

Ĉar multaj el vi persone konaŝ s-ron Dupuis, mi opinias necese informi vin laŭ ĉisupre. Mi ankaŭ aldonas kopion de responda letero, kiun mi hodiaŭ sendis al s-ro Dupuis.

Kore salutas

Kopio al la estraranoj de SEF.
Sköv̂de /Svedujo/ la 6:an de decembro 1945.

LANGUE ESPERANTO

S-ro Roland Dupuis

100, rue Lafayette

R o u e n.

Francujo

Kara samideano,

Akceptu mian elkoran kondolencon kaj estu tutcerta, ke kun mi kunsentas kaj partoprenas vian nemezureblan funebron la tuta estraro de Sveda Esperanto-Federacio.

Jes, mi bone komprenas, ke nun ĉio ŝanĝiĝis rilate al via vojaĝo al nia lando. Tamen mi konstatas, ke vi deziras viziti nian nacian kongreson de SEF, kiu okazos en Uddevalla /ĉe la okcidenta marbordo/ pentekoste 1946. Eventuale estos aranĝata t.n. somera universitato kunlige al la kongreso. Cetere mi momente ne povas doni detalojn pri la kongreso, sed ĝi certe estos kaj interesa kaj sukcesa.

Laŭ via deziro mi prizorgis kaj pagis por vi abonon je Sveda Esperanto-Gazeto, LA ESPERO, por la jaro 1946. Kotizon, kr. 4:-, vi povas repagi al mi ĉeokaze.

Mi konigis al la estraranoj de SEF vian afablan informon, ke vi akceptos svedan esperantiston en via hejmo okaze de vizito en Rouen.

Esperante baldaŭ reaŭdi de vi mi restas

kore via

/Lennart Åberg/